



PENSEO

N-ro 356

jun. / 2021

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 32-a jaro <http://www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm>

Hans-Georg Kaiser (Germanio)



Serĉado de l' feliĉo

Ĉu en sudo, ĉu en nordo,
ne troveblas ja konkordo.
Serĉu, serĉu, homo.
Vi ne trovos tuj feliĉon.
Serĉu en Sodomio.
Serĉu, hom', ĉirkaŭe,
dum avanc' antaŭe.
Sakru, serĉu, homo!

Serĉu ĉe fenestro,
ebrie dum Silvestro.
Serĉu sankte, homo;
serĉu post kurtenoj,
embuskas vin hienoj.
Sakru, serĉu, homo!

Oriente, okcidente,
fuĝas la feliĉ' envente.
Serĉu, sakru, homo!
Homkatenoj en malpaco
estas ĉie plu minaco.
En Eden' eĉ, homo,
trovos sin malstromo.

Neĝo

Neĝas kaj neĝas kaj neĝas
senĉese, senfine, senhalte,
el ĉiel' al la ter', el ĉiel' al la ter'
are flokoj falas elalte.

Pro l' silento de l' neĝo en miaj cerbĉeloj
io blanka sin montras mistere,
mi revante cerbumas, mi volus kompreni,
kion diras la blank' enkapsfere.

Kvazaŭ ia sopir' entenebre kaŝiĝas
kaj vekigiĝas en mi rememoro...
Kaj per sento plej stranga, malĝoja kaj ĝoja,
en mi batas konfuze la koro.

Ĉu la flokoj falintaj, jam ofte viditaj,
rememore en mi reviviĝas,
aŭ mi revas pri l' tag', kiu baldaŭ aperos
kvankam ĝi en la nokto kaŝiĝas?

Mi ne volas esplori la senton misteran,
mi nur revas, mi ĝuas, mi spiras;
ion helan mi sentas, heleco min logas,
al heleco la koro min tiras.



PS: La okuluma poemo estas parodio kaj bazas sin je
konata poemo de Zamenhof: Pluvo. La birdon
desegnis Tomi Ungerer. (HGK)

Ewa Grochowska (Francio)



Elmigrantoj

Kiel blunirgaj, papavaj semetoj,
Elirantaj el la sama kapsulo,
Ni frue konscias kun malgajeco,
Ke diŝjetitaj tra la vastan mondon,

For de la land' de nia infaneco,
For de la plej karaj familianoj,
Ni ne kreskas en la patra terpeco.

Elĉerpitaj de la ŝtormoj vekitaj
Ofte konsolon ni serĉas en preĝo.
Tra la ĝangalo de fremdlandaj moroj
Hakante la vojon, ni nur bezonas
Nian devenon gardi en la koroj,
Sopirante al nova vivĝardeno
Por reiĝi mirindaj, ruĝaj floroj.



Anna Vart (Francio)



Fidu...

La Suno silente parolas,
Eĉ ene de koro vi ploras,
Tiel, ke ĉiel, eĉ ne aŭdas,
Ja, la sufero ne videblas.
Kvankam unu bela voĉo
Venas! dorlotas en orelo,
Nenia kolero kaj riproĉo
Ne ŝanĝas la sun-parolo!
Jen! La varmeco de l'animo,
Eble, tenere haŭton karesas,
La klareco eliras de l'abismo,
Kaj la nova vivo komencas.
Fidu, la espero ne perdiĝas;
Kiam oni pripensas pozitive,
Tiam la sun-parolo resonas,
Kiel bela kanzono de birdo.
Kaj reburĝonas la ĉeriza arb'
Konkurante la belecon de flor'
La sufero de ĉagreno eskapas,
Kunportante la venenon de mal'.

08/05/2021

Mia koro tristus...

Tiel tristus mia koro,
Tiel nubas la ĉielo,
Kie sunas nova tago...
Kie ridas la vizaĝo...
Malamiko alvenas,
Sankta Tero ploras,
La soldato ne timas,
La milito komencas...
La Anĝeloj ekmiras,
Sur la tablen metas,
Proprajn vivojn donas,
Patrolandon savas!

15/05/2021

Sirik Slagmu (Francio)



Intenca scenario

Mateniĝas kaj denove tra la fenestro,
La printempo agas, kiel verda estro,
Tra la densa nebulo gutetetas la pluveto.
Videblas la ĝardeno kun ĉarma lageto,
Apenaŭ aŭdeblas la voĉoj de birdeto,
L'aero elspiras l'aromon de printempo.
Tra la trotuaro rapidas kelkaj pasantoj,
Silente kunportas la dorsajn sakojn,
Al la stacidom' alproksimiĝas la trajnoj.
Ĉiuj deziras forveturi el la detruita lando,
Certas, ke ankoraŭ ĉi tie regas la morto,
Kvazaŭ silente, ŝajne, ĝi kalkulas paŝojn.
Jen, la morto alvenas senbrue respirante,
La homoj portas la rememorojn pri pasinto,
Kiu plu neniam ne estus, kiel antaŭen.
Ene de dorso-sakoj plenplenigas envolvite
La fotoj kaj la rememoroj plej valoraj,
Ili gardas, kiel juveloj la identecon, vere!
Sed la kuraĝaj volontuloj denove ekstaris;
Por haltigi la malamikon, la pafilojn ŝargis,
La morto grondis! neniun ĝi plu timigis!
Destino! Necesas sur via vizaĝo spruĉi,
Ke la Tero de miaj pra-avoj fariĝis ruĝa,

Trempita per sango...pro malfido senjuĝa!
Sed ekstere printempas kaj floroj aromas,
La tero silentas, eĉ unu vorton ne diras,
Nur la Suno mezuras la angulon del' ĉielo
De la tempo pasinta kun rapidec' de lumo
La granda ombro de milito aperas sur muro
Ie ajn perdiĝis la kompasoj de l'espero....

16/04/2021

Ivanichka Magharova (Bulgario)



Printemp' ! Pluvas!
Birdoj de sudo flugas.
La tero frukta.

Sur la balkono Shi.
La alaŭdo kantegas.
Rozo estas tag'.

Printempa pluvo
ruĝtulipoj banas.
sin de rosgutoj.

Suvent' ekblovas.
La arboj ekfolias.
Tristas la nestoj.

Mildaj manplatoj
petas! Noktosoleca!
Violin' ĝemas!

Siringo odoras
en poeta ĝardeno
Aŭgoras Amo!

Jadranka Miric (Serbio)



Ĉiam Printempe

Kaŝis flava Luno malantaŭ nubaro.
Brodas luno tra senfino
gaje kun brilanta stelar'.
Laca sidis Luno sur la verda pin'.

Sur mia vojeto verdiĝas arbusto.
Printempe belas tiliar'.
Plenas je birdetoj ĉiu branĉar'.
Floras ĉarmaj floroj por ĉies gusto!
Kiam malgajeco okupis min
dolĉaj memoroj ravis min pri vi .
Mi ĝojiĝas dank' al vi
dum satkaresas karegan lin!

Amaj duboj kaj demandoj

Kiam amo floras
oni peton bezonas
por ĉielen ekflugi.
Se duboj longe daŭras
pro honto oni pasion facile forportas.
Doloro kaj sufero bumerange riproĉas !
Kiam ama malsato kaj soifo ekregas,
Senpacienca vi senhezite alvokas lin:
“Tuj venu kaj kisu min!”

Elsa Sylvie Marinelli (Usono)



Aŭ...

La timo kuraĝon mortas;
Pro la minac' de vivaĉo,
L'intelekto foren aperas;
Oni nin forĵetas nutraĵon.
Plus neniu ne komprenas;
Ĉirkaŭ ni okazas kion?
Oni nin, kiel bestoj, uzas,
Ke “progresu” la scienco.
Tamen la vereco montras,
Ke nin regas kruela Homo!
Ĉu, kiel sklavo transformiĝu,
Aŭ rezistu, kiel libera Homo!

24/04/2021

Susanne Kara Weill



Plorintaj okuloj estas...

La plorintaj okuloj estas,

Kiel la urba ponto longa,
La sunaj radioj alvenas,
Kiel la haroj de junfilino.
La plorintaj okuloj estas,
Kiel la floranta ĝardeno,
La flavaj kampoj estas,
Kiel forflugantaj papilioj.
La plorintaj okuloj estas,
Kiel ornamitaj sunradioj,
La printempa ĉielo estas,
Kiel turmentita oceano.

24/04/2021

Zara Sarkissianne (Francio)



Dolora pripensado...

La manipuladi oni vin devigas,
Kiam la sociestroj sin riĉigi volas!
Vi plu ne subtenas la malverecon,
Plu ne akceptas vivi sovaĝe!
Por kelkaj, vi fariĝas, kiel besto,
Kiu nur devus vivaĉi en la kaĝo.
Vi plu ne havas la personan vivon,
Ĉu, nur ilo por krei mon-piramidon?
Denuncas ĉies paŝojn tage farintajn,
La sentoj pri malsekureco aperinta,
Vian parolon kun ŝtopilo silentigas,
Jen, l'avareco la homaron mortigas!

21/05/2021

Iskouhi Avetiĝian (Francio)



Retransformiĝo

Sur l'urbo la ĉielo marŝas
pli rapide ol iu-ajn birdo,
la birdo flugas pli rapide,
ol la river' fluas al la mar',
en la maro la fiŝo naĝas
pli rapide ol la naĝanto
sed la homo ne povas
esti pli rapida ol la sono

ĉar la sono transformiĝas
al la muzikon belegan,
kiu resonas en la ĉielo

25/04/2021

Sirarnuish Slagmulder (Francio)



Suferado...

Mi sufiĉe vivis por rimarki,
Ke la homo fariĝas besto;
Kraŝinte sur vi la malamon,
Eĉ se vi laboris por postvivi.
En ĉi abismo ion malfermas,
Ke post la glitaĵo mi ekstaru,
Mi sufiĉe lacas batali kontraŭ,
Mensogon subteni ne povas.
Nune mi plu ne povas dormi
Pro la stuporo kaj la letargio,
L'enuo pilgrimas en anarkio,
Mi arde suspiras min liberigi.
Kondamni la buĉon d'avideco,
Mi plus ne povas min permesi
Subteni la ironion de turpeco,
Antaŭ, ke la nokto malaperu!

26/04/2021

Elena Popova (Bulgario)



La mirinda papilio

Freŝa roza floro
dum matena horo
allogis intereson
en vivul' neforgesa.
Ĝi polvigis sukcese
la florojn silente.
Ne atendu mielon—
elflugis al ĉielo.
Nur belecon portas
la papili' senmorta.



Miĥail Frolov (Rusio)

Paroli ĉesis arbareto ora
 Per sia lingvo gaja de betuloj,
 Enflug' malĝoja de gruaro fora
 Bedaŭro plu ne estas pri vaguloj.
 Bedaŭri kiun? Ĉiu ja — en vago,
 Denove venos por forlas' de l' hejmo.
 Kun luno sonĝas apud blua lago
 Pri forpasintoj ĉiuj kanabejo.
 Mi staras sola en la kamp' ebena,
 Kaj portas foren la gruaron vento,
 Mi estas pri l' junec' per pensoj plena,
 Sed pri l' pase' min ne vizitas sento.
 Ne pri la vane disipitaj jaroj,
 Ne pri l' anim' meditas mi bedaŭre.
 Kaj sorpoj ruĝas en ĝarden' per fajroj
 Sed ne varmigas iun eĉ nedaŭre.
 Flavec' ne kaŭzos de la herb' defalon,
 Ne estos bruligitaj sorphrapoloj,
 Kaj kiel arb' faligas foliaron,
 Faligas mi malĝojon de paroloj.
 Se tempo ilin, kiel vento sola,
 balaus for en unu bul' rubara...
 Vi diru tiel: arbareto ora
 Paroli ĉesis per la lingvo kara.

*Traduko de l' rusa poemo "Отговорила роща
 золотая" (Sergej Jesenin).*

Siv Burell (Svedio)



Al la malnova vilaĝo

Mejlon post mejlo
 aŭto post aŭto
 preterveturas
 unu la alian.

La takto estas febreca
 en ĉiuj lenoj.
 Rapido rapideca
 eĉ ĉe aŭtoj kun treno
 ĉiam rapidaj movoj.
 Danĝeraj slalomaj provoj.

Ni plurulas
 kiel sur trako
 en aŭto malnova
 vera ĉabrako
 sed kun silvra tegment'.

Do, plutrotu, kara ĉaro
 fidinda estas vi,
 trankvilaj estas ni.
 Ni antaŭeniros al amikaro.
 Fine la vilaĝeton atingos ni.

VIOLA ISUFAJ



Ĉielbluaj prunoj

Ĉu vi memoras pri la ĉielbluaj prunoj
 Sur la ĉielarkaj irisoj?
 Kaj pri la rabiaj hundoj
 Ĉu ankaŭ la ursojn de la ursodresantoj
 Kaj pri la malĉasta instruistino?
 Kaj kiam mi forpelis disde la malriĉa kvartalo
 sep sorĉistinojn
 Kiuj superŝutis cindron sur viajn paŝojn?

...

...

Estis tiel malfrue kiel la predo de la Serpento
 subŝtona

Estis tiel frue kiel la unua Radio neniam
 aperinta.

Laŭdo- [Haleluja!] Pri mortebla dio

Mi laŭdon donacas al la majesteco de la naturo
 Ĉar ne plu meritas donacaĵon mia mastro
 Nur la mara ŝaŭmo kiel liaj haroj estas
 Kaj la silko — kio do por li mi estas
 En la sincera supozo
 La griza fumo, sendube, al lia ĉagreno similas
 En la momento kiam la manojn surkapen li
 metas
 Kaj la purpura uragano frenezecas
 La laŭroj kovritaj de la lumo lia gloro estas

La olivarbaj branĉoj liaj skapoloj ja estas
 La venteto estas lia spiro kiam li min amas
 Kaj la malvarmaj vaporoj estas ĉiam lia parolo
 La suno en sia mirakla pasado
 Estas ja lia irado tra la nuboj
 Kaj tra la sinjorinaj homamasoj
 Mi deziras ĝui ĝisoste la ravecon de la naturo
 Ĉar ne plu meritas laŭdon mia mastro

Nu ni pardonu mian pekintan mastron
 Kaj liajn, plene de faltoj, vestaĉon
 Ne vane diru ke mi alpaŝu sur ties vojo
 Ne diru min ĉirkaŭbraki liajn palmojn sur la
 sablo
 Mi ne konfesas, neniel konfesas la malbonon
 Nu ni pardonu...Ni pardonu mian mastron!

Elalbanigis



Bardhyl Senimi
 (Albanio)

El Ĉina Antikva Poezio

Chao Buzhi (1053-1110)

—laŭ melodio *Fiŝado*

Lageton mi aĉetis, plantis
 salikojn ĉirkaŭ ĝi plenplene.
 Ĝi ŝajne ja aspektas kiel
 pejzaĝ' de riverbordo scene.
 Ĵus bona pluvo kaj ŝvelinta akvo
 allogas mevojn kaj ardeojn jen bonvene
 ĉi tie kolektiĝi grupe.
 La plej ŝatata loko, ter-edene,
 ja estas sablobenko, kiu
 sub luna lum' etendas sin ebene
 kaj dronas tute en silento.
 Ekdancas sola mi senĝene
 sub la ĉielo kiel baldakeno,
 sur mola herb-tapiŝ' satene.
 Mi jam findrinkis vinon ĝis ebrio,
 mi tamen ne min trenas hejmvrene.

Mi ne plu rememoras pri paseoj,
 ĉar ruinigas min la ofic-kariero.
 Iame kiel loka oficialulo,
 meriton mi ne gajnis kun fiero,
 mi male eĉ neglektas mian vivon
 rustikan kaj ermitan de fabelo.
 Mi en spegulo jame trovas
 grizharojn ĉe tempioj en prospero.
 Jen tiuj laŭdoj pri meritoj estas
 nur senutilaj vortoj sen espero.
 Eĉ se mi gajnus grandajn la meritojn,
 kiel aliaj generaloj, tra batal-sufero,
 jam estus tro malfrue por mi
 reiri hejmen por la paca vivo kun prefero.

Mao Pang (?-?)

—laŭ melodio *Serena muziko*

*Mi forsendis du maljunajn amikojn kaj drinkis
 en mia korto. Ni fiksis la daton de la venonta
 renkontiĝo.*

Dum abrikotfloroj jam prosperas,
 umearboj du en kort' malgrase jen aperas.

Ili estas buntkoloraj nuboj el ĉielo,
 kaj danc-festas vian altan aĝon kun sincero.

Lun' kaj briz' alvenos tuj por festi,
 por ke mia korto ne malplenu resti.

Por venonta renkontiĝ' la daton fiksu ni,
 lun' kaj briz' invitos vin ja per pasi'.

Zhou Bangyan (1057-1121)

—laŭ melodio *Virina ĉapo*

Mi ekbruligas nun incenson
 por peli varman humidecon for.
 Ĝojplene birdoj ĉirpas
 sub tegmentrando por
 heroldi venon de serena tago.
 La nova sun' sekbakas per brilglor'
 la rosojn sur lotusfolioj,
 verdetaĵ, rondaj, kiuj jen en ĥor'
 skuiĝas sur la akvsurfaco
 en briz' blovanta kun petol'.

Hejmloko mia malproksimas,
 kiam mi povos vidi vin denove?
 Mi loĝis sude de Jangzi-rivero,
 sed mi nun restas longe tie ĉi senmove.
 Ĉu miaj fiŝistoj-amikoj en hejmloko
 ankoraŭ tenas min en kor' bontrove?
 Mi remu boateton en lotuslageton
 hejmlokan songe glite rapidŝove.

—*laŭ melodio Papilio super floroj*

La luna brilo ĝenas korvojn
 en ties dormo paca kaj trankvila.
 Elfluo de klepsidro tuj finiĝos,
 alproksimiĝas la aŭroro brila.
 Aŭdiĝas sonoj de la vinĉo
 ĉe l' put' akvo-eltira.
 Mi vekis l' amatinon mian,
 sed vidas mi ŝin ve-suspira
 kaj la kapokan kapkusenon
 malsekigita de la larm' korŝira.

Mi tenas ŝian manon
 kaj iras domaĝeme al la korto.
 Venteto taŭzas niajn harojn.
 Disiĝ' jam destinitas laŭ la sorto,
 ni ne voluntas piki unu la alian
 la koron per disiga vorto.
 La Norda Stel' jam alte pendas
 super mansard' ĉe flank' de nordo.
 Aŭdiĝas kokerikoj de la foro,
 atakas nin roseroj kun frost-mordo.

—*laŭ melodio Printempo en jada pavilono*

Mi pentas, ke mi ne kunvivas kun ŝi
 ĉe Persik-rojo en trankvilo plu,
 simile al rompita la lotusradiko, kiu
 neniel estus kunmetita per kunglu'.

Tiame ambaŭ ni atendis
 ĉe l' ponto Chilan jen por rendevu',
 sed nun mi sola paŝas sur la pado
 kovrita per folioj flavaj en enu'.

Maldensaj nebulfum' vualas
 montvicojn kaj montvicojn sen kalkulo.
 Sovaĝanseroj flugas trans la montoj,

kun sunrebril' surdorse en nebulo.
 Simile al la nuboj ventpelata,
 perdiĝas hom' senspuro en riverspegulo.
 Simile al salika flock' pluvogluita,
 amsent' nedisigeblas kiel koagulo.



—*laŭ melodio Malligi jadan ĉenon*

Mi lamentas senkonsola,
 l' amatin' min lasas sola.

El ŝi la mesaĝo kaj letero
 ne atingas min plu kun espero.

Eĉ lertul' l' enigmon solvas malsukcese,
 la amsento dispeliĝas, kiel nub', forgesse,

kvazaŭ pluvo ĉesas pro ventpelo
 kaj nebulo vaporiĝas en ĉielo.

Jam forflugis la hirundoj el loĝejo ŝia,
 restas nur fatras' en la malplena ĉambro fia.

Volus mi priplanti la ĝardenon per
 novaj floroj, sed bedaŭre sur la ter'

staras ruĝaj peonioj kiujn ambaŭ ni
 kune inte plantis jen kun emoci'.

Sur sablbenko herboj jam prosperas,
 en imagu' mia ŝi per la boato celas

al la malproksima lok' leĝere
 laŭ zigzaga riveroj' libere.

En memoro ni intimis kvere,
 interŝanĝis la leterojn ja sincere.

Sed nun ili ĝenas min mizere

kaj turmentas miajn pensojn ja kruele.

Vere volus mi bruligi ilin tute
ho, ĝis cindr', malbonkondute.

La printempo ree venas al dometo
mia ĉe rivero en kvieto.

Mi ankoraŭ ja atendas kun espero
umeflorojn de ŝi el la suda sfero.

Mi voluntas antaŭ vin' kaj floro
por vi plori ja kun kordoloro.

elĉinigis



Vejdo (Ĉinio)

Xu Fu (1075 - 1141)

Printempa ekskurso ĉe lago

Kiam do hirundoj reflugos pare en feliĉo?
Floras persikarboj ĉeborde, akvon tuŝtante.
Kaj netraireblas la ponto pro akvoleviĝo,
sed pramo el ombro salika aperas mallante.

Cao Bin (1170 - 1249)

En malfrua printempo

Neniu, ekster pordo, zorgas pri falintaj floroj,
la ombra verdo sin etendas ĉie sur la tero.
Kiam jam ne plu pepas interarbaj oriojoj,
mi sole aŭdas ranajn kvakojn ĉe lageta sfero.



Yang Shen (1488 - 1559)

Kampara ekskurso

La terasokampoj ŝtupare leviĝas,

dum plataj rizejoj ŝajnas ŝaktabuloj.
Ardeoj subite alflugas kaj punktatas
la verdon rizkampan per blankaj makuloj.

Wang Yucheng (954 - 1001)

Promenado preter vilaĝo

Flaviĝas krizantemoj, mi rajdetas sur ĉevalo
laŭ monta pado, impresite pri l' pejzaĝo kruda.
L' aŭtuna vento estas eĥiĝanta en la valo,
en vesperruĝo la montopintaro restas muta.
Folioj de sovaĝaj piroarboj nun karminas,
dum fagopiraj floroj neĝe blankaj bonodoras.
Sed kio, kiam mi recitas versojn, min afliktas?
El la vidaĵo mian hejmolokon mi memoras.

Yao Nai (1731 - 1815)

Surmonta promenado

Kukoloj superflugas por instigi kultivadon;
ardeoj frapas per flugiloj en sunaj radioj.
Mi iras sur vojeto inter rokoj kaj arbustoj,
aŭdeblas sur montkampoj sono de irigacio.
elĉinigis



Minosun (Ĉinio)



Zhuangzi

ĈAPITRO DUDEK-KVARA

Xu Wuguī

§24-13

Troviĝas tiuj, kiuj estas vante malmolestaj;
troviĝas tiuj, kiuj estas kontentaj pri kelktempaj
trankvilo kaj komforto; kaj troviĝas tiuj, kiuj senfine
laboregas.

Tiuj, kiuj vante malmodestas, lernas la vortojn de iu instruisto kaj ĉiam papagumas. Vantaj kaj malmodestaj, ili tamen ne scias, ke ili en efektiveco lernas nenion. Jen kial oni nomas ilin vante malmodestaj.

Tiuj, kiuj estas kontentaj pri kelktempaj trankvilo kaj komforto, estas kiel la pedikoj sur porko. Ili elektas sur la porko lokon, kie la haregoj estas maldensaj kaj longaj, pensante, ke ĝi estas granda palaco aŭ vasta ĝardeno. Ili rigardas la lokojn inter la femurfaldoj, la mamojn ktp. kiel siajn komfortajn ĉambrojn kaj agrablan loĝejon. Ili ne scias, ke pli aŭ malpli baldaŭ la buĉisto svingos siajn brakojn, alportos faskon da branĉetoj kaj faros fajron, kaj forbruligos ilin kune kun la porkaj haroj. Ili prosperas kun la medio kaj pereas kun la medio. Jen kial oni nomas ilin kontentaj pri kelktempaj trankvilo kaj komforto.

Tiuj, kiuj senfine laboregas, estas tiaj homoj, kia la reĝo Shun estis. La ŝafaĵo ne amas la formikojn, dum la formikoj amas la ŝafaĵon, ĉar tiu ĉi havas fortan odoron, kiu altiras la formikojn. La ordinaraj popolanoj amis la reĝon Shun, ĉar li havis ŝafaĵan odoron, nome la humanan konduton. Shun trifoje ŝanĝis sian ĉefurbon, ĝis fine li elektis la dezertan ebenaĵon Deng por la ĉefurbo. Pli ol cent mil familioj lin sekvis. La reĝo Yao aŭdis, ke Shun estas virta indulo kaj donis al li la sterilan regionon esperante, ke li superŝutos la popolon per siaj bonfaroj. Shun laboregis en tiu regiono ĝis li maljuniĝis kaj kadukiĝis, sed li ankoraŭ ne povis ekŝiĝi por ĝui ripozon. Jen kial oni nomas tiajn homojn senfine laboregantaj.

Tial la de dio inspirita homo abomenas havi multajn homojn kolektiĝantajn ĉirkaŭ li. Kiam multaj kolektiĝas ĉirkaŭ li, tiam devas esti disputoj; kiam estiĝis disputoj, tiam devas esti malavantaĝoj al li. Kaj tiel, li estas nek tro intima al iu ajn, nek tro fremda al iu ajn. Li kulturas sian virton kaj nutras sian harmonion, por konformigi sin al la mondo, kaj pro tio li estas nomata vera homo, sen la saĝeco de la formikoj, sen la senzorga agrableco de la fiŝoj en la akvo kaj sen la intenco de la ŝafoj eligi altirantan odoron.

Li uzas siajn okulojn nur por rigardi kion li povas vidi; li uzas siajn orelojn nur por aŭskulti kion li povas aŭdi; li uzas sian menson nur por pripensi tion, kio

povas esti pripensata. Tiel agante, li povas esti nature kvieta kaj ĉiam konformigi siajn ŝanĝigojn al la naturo.

En la antikveco la veraj homoj traktis la homon laŭ la Taŭo de la ĉielo kaj ne ĝenis la ĉielon per la homaj aferoj. Ili opiniis, ke la vivo estas akiro kaj la morto estas perdo, aŭ ke la morto estas akiro kaj la vivo estas perdo.

§24-14

La tiel nomataj medikamentoj estas ne pli ol la rizomo de akonito, la radiko de platikodono, eŭrialo kaj umbela poliporo ktp., el kiuj ĉiu povas esti uzata kiel la ĉefa kuracilo por diversaj malsanoj. La listo estas senfina. Kiu do povus klarigi la misteron de la medikamentoj?

§24-15

Kiam la reĝo Gou Jian de la regno Yue retiriĝis kun siaj tri mil soldatoj sur la monton Kuajji, nur lia ministro Wen Zhong sciis kiel savi tiun ĉi pereantan regnon, sed li tamen ne sciis antaŭvidi sian propran ruiniĝon post la venko de sia reĝo super la malamiko. Tial, estas dirite: “La okuloj de la strigo taŭgas por vidado nur en la nokto; la kruroj de la gruo havas sian destinitan longecon — tranĉe mallongigi ĝin kaŭzos aflikton.”

Tial estas dirite: “Kiam la vento blovas, la rivera akvo malkreskas; kiam la suno brilas, la rivera akvo same malkreskas. Kaj tamen, kiam la vento blovas kaj la suno brilas samtempe, la rivera akvo tute ne malkreskas, ĉar tiam estas konstanta alfluo de ĝia fonto.” Tiel estas evidente, ke la akvo estas nedisigebla for de la tero, ke la ombro estas nedisigebla for de la homo mem, kaj ke unu objekto estas nedisigebla for de la alia.

La okuloj estos vunditaj, se ili estas trostreĉitaj; la oreloj estos vunditaj, se ili estas trostreĉitaj; la menso estos vundita, se ĝi estas trostreĉita. Tro da sprito vundas la homan menson, kaj estas tro malfrue por penti kiam la vundo jam estas farita. La malfeliĉo kreskas kun la tempo kaj, por ĝin eviti, oni devas kulturi sin por reveni al la origina natura stato. Oni bezonas sufiĉe longan tempon por atingi la atendatan rezulton. Ĉu ne estas bedaŭrinde, ke oni konsideras la

talentojn kaj sukcesojn kiel siajn trezorojn? Rezulte de tio, ofte ruinigoj estas kaŭzataj al la regno kaj la popolo, sed oni rifuzas aŭskulti tiun ĉi rezonadon.

§24-16

Kvankam la homaj piedoj okupas nur tre malgrandajn pecojn da tero, tamen ĝuste pere de la tuta spaco de la tero, kiun la piedoj ne okupas, la homo povas marŝi sur la vasta tero. Kvankam la homa inteligento penetras nur tre malgrandan parcelon de la totalo de la scioj, tamen ĝuste pere de tio, kion la inteligento ne penetras, la homo povas kompreni, kio estas la ĉielo.

Oni atingas la plej grandan sciadon, se oni konas la grandan unuon, la grandan obskuron, la grandan vidon, la grandan ekvilibron, la grandan leĝon, la grandan fidon kaj la grandan pacon. La granda unuo kunigas ĉion en la mondo; la granda obskuro disigas ĉion en la mondo; la granda vido penetras ĉion en la mondo; la granda ekvilibro raciigas ĉion en la mondo; la granda leĝo regas ĉion en la mondo; la granda fido gajnas ĉion en la mondo; la granda paco konservas ĉion en la mondo.

Se via menso ampleksos ĉion en la mondo, vi ampleksos la naturon; se vi sekvos la naturon, vi havos klaran perspektivon; se vi atingos la landon de obskuro, vi povos returniĝi; se vi atingos la originan komencon, vi atingos la Taŭon.

Via interpreto pri la naturo ŝajnas ne tia, kia la interpreto devas esti; via kompreno pri la naturo ŝajnas ne tia, kia la kompreno devas esti; via kompreno venas el nekompreno. Kiam vi esploras ion, vi devas fari nek jesigon, nek neadon. Ĉiuj estaĵoj estas tiel diferencaj inter si, sed ĉiu el ili havas sian realecon. La pasinteco kaj la nuneco povas nek anstataŭi unu la alian, nek influi unu la alian. Ĉu tio ne estas ĝenerala leĝo? Kial vi ne ĝisfunde demandas pri tio, por forigi vian konfuzon? Se vi penas solvi vian konfuzon per tio, pri kio vi ne estas konfuzita, vi revenos al la senkonfuzata stato. Tiamaniere vi estos en la plej kompleta senkonfuzeco.

Elĉinigis



Wang Chongfang
(Ĉinio)

Ĉineske

Eto (Ĉinio)

Infanoj ĝoju

okaze de l' Internacia Infana Tago
—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Infanoj
en la festa tag'
devus ĝoji kun rido
en milda patrina brak'
aŭ en paca pak'.

Militfajr'
tamen sur la ter'
brulas tre arde ĉie
kaj bomboj per la sufero
falas el ĉiel'.

Ne kaŝej'
protektas bone
l' idojn sur la vastejo.
Ili ploras laŭtsone,
vagas ĉifone.

Malsato
estas problemo
por ilia stomako.
ne vidiĝas ja greno
nek ridmieno.

Infanoj
dum tag' kun ploro,
nokte en mava dormo,
petegas en angoro
por pan-trezoro.

Precipe
en fi-pandemi'
ili suferas multe,

aŭ disde la famili'
aŭ en agoni'.

Ja mankas
taŭga kuracil'
al ili kontau' l' plago,
restas nur kor-maltrankvil'
kaj plora ĝem-tril'.

Infanoj
en la festa tag'
devus ĝoji kun rido
en milda patrino brak'
aŭ en paca pak'.

Jadranka Miric (Serbio)

Printempe

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Printempe
vekiĝas natur'.
Gluiĝas odoroj el
la florpotoj sur la mur'.
Mira aventur'.

Monato
Majo admiras.
Matene frostas tage
ventas aŭ ofte varmas,
dum noktoj freŝas!

Salikej'
jen, riverborde
verdiĝas. Ĉi-apude
fraŭlin' pozas senvorte,
tute bonorde!

Fraŭlino
bela, malgaja
vi estas. Kial okul'
mia, larmoj? Ĉu fia
estas am' Maja?

Aperis
suno. Vigliĝas
gaje natur' kaj homoj.
Birdar' pepante jesas
ke jen, pritempas!

**Sopir-al-sudo* (ĉine: *Yijiangnan*): ĉina fiksforna poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimarango *xa,xa,a* (*x=senrima*).

Yanke (Ĉinio)

Pino

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

Pin'
staras alte sur montpint'
verdplena
kun fera anim'.

Ĝi
radikas kun energi'
en teron,
kreskas kun pasi'.

Ĝi
strebas alten kun konsci'
decide
jen sen fantazi'.

Ĝi
ĉiam fronte al defi'
batalas
firme sen anksi'.

Ĝi
kreskas pompe pli kaj pli
en venta
kaj pluva muĝ-kri'.

Ĝi
tamen falas ja sensei'
pro homa
detrua magi'.

* *Dekses-Silabo: ĉina fiksforna poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*

Xi Murong



Soleca arbo

Somere de tiu jaro, kiam mi estis dudekdujara, mi vidis belan arbon.

Tiusomere mi kaj Nora sin distris tre ĝuplene en Svislando. Ŝi estis blondhara knabino devenanta de Irlando. Ni ambaŭ sekvis la someran kurson pri la franca lingvo en Freiburg-Universitato (Albert-Ludwigs-Universität Freiburg). En la semajnfina ferio ni, per po luita biciklo, libere kuradis laŭlonge kaj laŭlarĝe tra montoj kaj sovaĝejoj, tiel ke preskaŭ ĉiujn urbetojn ni jam vizitis. La plej ŝatata afero, kiun ni faris, estis rajdi bicikle ĝis la supro de deklivo kaj poste malsuprenliti laŭ la kruta kaj sinua vojo. Mi tre ŝatis la rapidecon, kiu blindigus miajn okulojn kaj haltigus miajn spirojn. La arboj ĉe ambaŭ flankoj de la vojo alpreme renkontis nin kaj la alvizaĝa vento sibladis preterfulmis. Tio tuj vekis ĉe mi aŭtomatan deziron sible flugi.

En somero sovaĝejoj en montoj sin montris freŝaj kaj ĉarmaj. Ĉiu kurbiĝo de la vojo subite prezentis neantaŭvideblan belecon.

Tiu arbo aperis dum tiaj horoj.

Apenaŭ ni turniĝis ĉe abrupta kurbiĝo, aperis neprofunda valo, sur kies transa oblikva deklivo estis kreskigita vasta arbaro.

Probable ĝi estis forstumita arbaro, ĉar sur la tuta oblikva deklivo staris samspecaj arboj. Eble pro bona ricevo de la sunlumo tiuj arboj portis junverdajn frondojn kun baldakeneca krono. Nur sola arbo aparte distingiĝis sur la tuta verdejo oblikviĝanta ĝis la stepo en la rivervalo.

Starante ĉe la fronta vico de la arboj ĝi plene portis orflavajn foliojn kaj buntajn rondojn, en kiuj pli buntaj aŭreoloj glimis tavolo post tavolo. Ĝi certe staris tie longatempe, ĉar sur la herbejo sub ĝi jam sterniĝis rondo da orflavaj falfolioj. Kvankam mi staris kontraŭ

la oblikva deklivo, mi ankoraŭ povis vidi, ke folio ĵus falas kaj ekfrapas la antaŭajn falfoliojn sur la tero, donante la kontraston kun tiuj lastaj jam iom-post-iome velkintaj kaj dekoloriĝintaj.

Proksime al vesperkrepuskiĝo la ĉirkaŭa ombro malheliĝis laŭgrade, sed tiu arbo volvita per orflaveco des pli eligis misteran lumon. Komparante kun kelkcent samspecaj kaj samgrandaj arboj junverdaj, nur tiu ĉi orflava arbo ŝajne konvenis kreski sur tiu ĉi deklivo. Tamen ĝia distingiĝo de la aliaj arboj sentigis ĝin en granda embaraso, kaj ĝi vole nevole surportis varmajn, delikatajn kaj briletajn foliojn tra la tuta korpo, starante solece tie kun nekomprenebla tristo.

Nora diris: “Estas tre malfrue. Ni reiru.”

“Sed la ĉielo estas ankoraŭ hela,” dirante, mi malsupreniris al la rivervalo. Mi volis iri pli proksimen zorgeme pririgardi tiun unikan arbon.

Sed Nora insistis reiri. En ordinara tempo ŝi ĉiam estis akomodema kunvojaĝantino, tamen tiun someran posttagmezon ŝi parolis en nerifuzebla tono.

Pro tio mi ne iris ĝis la rivervalo.

Eble Nora estis prava. Post multaj pasintaj jaroj, kiam mi rememoris pri tio, mi sentis, ke ŝi eble estis prava. Ĉiuj belecoj, kiuj meritas domaĝon, bezonas teni sin de vidantoj je unu peco da distanco. Se mi alproksimiĝus al la arbo tiutage, mi eble trovus kreviĝon de folioj kaj deŝeliĝon de la trunko, tiel ke reduktiĝus mia granda laŭdo je la unua vido al la arbo. Sed mi neniam iris ĝis la rivervalo. (Dum mia tuta vivo mi neniam reiras, neniam iras ĝis la rivervalo nek suprengrimpas tiun deklivon en la sama momento de la sama tago.) Pro tio tiu arbo povas kreski tie konstante, kvankam solece, tamen tenante ĝian orflavecon dotitan de la ĉielo.

Kia favoro dotita de la ĉielo ne renkontas la solecon en la homa mondo?

elĉinigi **Fangfang (Ĉinio)**



Eldonas Redakcio de *Penseo*

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)

Retadreso: vejdo@163.com

www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm

